N. N. 29,

# Bela tag'

*tradukita de Joachim Gießner*

Belegan tagon ĝuis ni,
ho, kia rara grac'!
Nur ĝojon puran donis ĝi,
senzorga amdonac'.

Kun jubilado de l'alaŭd'
vekiĝis la maten'.
Orumis poete ĝin la sun',
la tagon en seren'.

Belega tag' en harmoni'
pli lumas ol juvel'.
Radias, vokas: tiu tag'
vin gvidu al ĉiel'!

Kaj kia sorto trafos vin,
se venos zorg' kaj plag',
por ĉiam restos la memor'
je nia bela tag'.

Sed krom memoro tiu tag'
ja estas multe pli:
Ĉar helpu ĝia varma am'
dum ĉiu temp' al vi.

...

N. N. 29,

# Ein schöner Tag

Ein schöner Tag ward uns beschert
Wie es nicht viele gibt,
Von reiner Freude ausgefüllt,
Von Sorgen ungetrübt.

Mit Liedern die die Lerche singt ,
So fing der Morgen an,
Die Sonne schenkte gold´nen Glanz,
Dem Tag der dann begann.

Ein schöner Tag voll Harmonie,
Ist wie ein Edelstein,
Er strahlt Euch an und ruft Euch zu,
“Heut soll´t Ihr glücklich sein.”

Und was das Schicksal uns beschert,
Was immer kommen mag,
Es bleibt Euch die Erinnerung ,
An einen schönen Tag.

..............................................
..............................................
..............................................
..............................................

...

*Traduko de la Germana poemo "Ein schöner Tag" de N. N. 29 en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-615-1236 (2012-10-17 16:21:57)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la poem- kaj kanto-kolekto* http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html *. La teksto estas kantebla laŭ jena melodio:* http://www.mamas-truhe.de/lieder/ein-schoner-tag-ward-uns-beschert.html *.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 29.*

*Arg-615-1235 (2012-10-17 17:21:11)*

*Die Melodie zu diesem Lied siehe:* http://www.mamas-truhe.de/lieder/ein-schoner-tag-ward-uns-beschert.html *. Siehe auch:* http://www.golyr.de/lena-valaitis/songtext-ein-schoener-tag-553129.html *und* http://www.donauschwaben-usa.org/Ein%20Sch%C3%B6ner%20Tag.htm *.*